
# *Kuba prezidento gratulas la Junularajn Klubojn kreitajn de Fidel Castro anta? 35 jaroj*




**Fidel Castro en la junularaj kluboj de komputiko**

Havano,  sep 8 (RHK) La prezidento de Kubo, Miguel Díaz-Canel, rememoris la tagon, en kiu la historia gvidanto de la Kuba Revolucio, Fidel Castro, ina?guris la unuan Junularan Klubon pri Komputiko kaj Elektroniko, hodia? anta? 35 jaroj.

La kuba prezidento referencis al la frazo de la ?efkomandanto, kiam li rekonis la efikon de teknologio en la nuntempa mondo: "La socio, kiu ne estas preta por la uzo de komputiko, estas likvidata".

Same, Díaz-Canel esprimis, ke en tiu "neforgesebla tago, mi vidis miajn revojn en liaj vortoj kaj en la realo".

Dume, la ?efministro, Manuel Marrero, anka? transdonis gratulon tra la sama socia reto al la laboristoj de la Junularaj Kluboj de la lando pro la festoj de la datreveno de "La komputilo de la kuba familio", li diris.

La ideo de Fidel Castro havis la celon kontribui al la socii?o kaj komputiligo de la kuba socio kaj estis la unua kaj sola projekto en la mondo kiu, pro sia amplekso, proponis multe kontribui al la kono de komputilaj kaj elektronikaj teknikoj.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/298639-kuba-prezidento-gratulas-la-junularajn-klubojn-kreitajn-de-fidel-castro-antau-35-jaroj

Radio Habana Cuba